

FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE	28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX	55/3 Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT	26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON	7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE	12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

==== N° 173 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1992 ====

N.B. La materialo por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

Au cours de l' été qui commence, beaucoup d' entre nous participeront à des congrès ou des rencontres espérantistes. Ils pourront ainsi communiquer facilement avec des étrangers et tirer profit de leurs entretiens.

Ceux qui n' auront pas cette possibilité ne resteront pas dans le cocon de leur quant à soi. Ce serait désolant pour des espérantistes, surtout chrétiens. Au contraire, ils en profiteront pour s' ouvrir aux problèmes de notre monde multiforme et, au delà des préjugés et des clichés, pour s' informer et réfléchir aux difficultés complexes des divers peuples de l' Univers. Seuls en effet la compréhension, la tolérance et l' amour du prochain peuvent aider à les résoudre dans l' esprit de l' Evangile.

A. B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Dum la baldaŭ komenciĝonta somero, multaj el ni partoprenos Esperanto-kongresojn aŭ renkontojn. Tiel ili povos facile komuniki kun alilandanoj kaj el-tiri profiton el siaj konversacioj.

Kiuj ne havos tiun eblecon ne restos en sia ebura turo. Estus plorinde ĉe esperantistoj, ĉefe kristanoj. Male, ili profitos la libertempon por informiĝi pri la problemoj de nia bunta mondo kaj, trans la antaŭjuĝoj kaj kliŝoj, mediti pri la gravaj malfacilaĵoj de la diversaj popoloj. Komprenemo, toleremo kaj am-al la proksimulo povas efektive esti la nuraj helpiloj por ilia solvado en la evangelia spirito.

. Anos amis non encore espérantistes
Peut-être aimeriez-vous recevoir une information plus complète sur l' Esperanto.

Ecrivez à U.F.E. 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS.

MIA SOLA SUBTENANTO

Kien ajn mi iras, Vi estas la kunulo,
kiu tenas mian manon kaj kondukas min.

Sur tiu vojo, kie mi iras,
Vi estas mia sola subtenanto.

Apud mi Vi surportas mian ŝarĝon.

Se, piedirante, mi vojeraras,

Vi korektas min:

Vi rompis mian kontraŭstaron.

Ho Dio, Vi antaŭen puŝis min.

Ĉiuj estaĵoj, ĉiuj homoj
fariĝis miaj plej amataj fratoj.

Nun Via ĝojo penetras kaj ĉirkaŭas min.

Mi estas kiel knabo ludanta dum festo.

TOUKARAM

+++++

KAJ LA RANOJ SILENTIS...

La pikarda legendo de S-ta Ulphe (Ulf) kaj S-ta Domico (Domis) havas la freŝecon kaj dolĉecon de la ferakontoj. Ĉu vere temas pri legendo?...

En la VIII-a jarcento, en kastelo ĉe la limo inter Vermandois kaj Soissonnais (regionoj de la pikarda provinco), vivis bela juna fraŭlino, kiun ne amuzis la distraĵoj de la nobelaro, kaj kiu pensis nur pri Dio.

Iun matenon, Ulphe forfuĝis, iradis tre longe ĝis ŝi havis piedajn vundetojn kaj iĝis senforta. Elĉerpita, ŝi ekdormis ĉe la bordo de la rivero Noye (departemento Somme), malpli ol tri francajn mejlojn de Amiens; en sonĝo la S-ta Virgulino aperis al ŝi, kaj kiam ŝi vekigis "kun pepetado de birdoj, en la parfumo de la herbejo", ŝi vidis veni al ŝi oldulon. Estis Domico, la ermito de Fouencamps (vilaĝo apud Boves), ekskanoniko de S-ta Maria-de-la-Martiroj en Amiens. Ulphe rakontis al li sian historion, kaj Domico, konvinkite pri ŝia fido, prenis ŝin sub sia protekto. Ekde la morgaŭo, li kondukis ŝin al la matutino en la preĝejo S-ta Maria-de-la-Martiroj (nun S-ta Achèul)(Aŝel) kaj prezentis ŝin al la episkopo Chrestien (Krestien); ĉi tiu benis ambaŭ ermitojn sub aklamado de la fideluloj kaj sendis ĉarpentistojn por konstrui kabanon por Ulphe en loko nomata "Le Paraclet"(Parakleto).

Ĉiunokte Ulphe kaj Domico rekuniĝis kaj iris por aŭdi matutinion en Amiens tra iu vojeto, nun nomata "de St-Domico". Iun matenon, tamen, kiam Domico frapis ĉe la kabana pordo, neniu respondis; la oldulo insistis, sed vane. Li pensis, ke li malfruas kaj supozis, ke Ulphe jam foriris sola. Sed ŝi ne estis en la preĝejo. Malkvieta, la ermito rapide revenis al Parakleto. Tie, li trovis Ulphe ĉe la bordo de la lageto parolantan al la ranoj. Ŝi ilin riproĉis, ĉar ili tiel laŭte kvakis tiun nokton, ke ŝi ne povis dormi kaj ekdormis nur ĉe la ektagiĝo; ŝia dormo estis tiel profunda, ke ŝi restis surda je la alvokoj de Domico kaj maltrafis matutinion. Ulphe paroladis, Ulphe preĝadis, etendante la manojn al la raĵoj, kiuj daŭrigis sian bruegon. Kaj subite ekestis silento. Obeemaj, la ranoj estis silentintaj. Oni diras, ke ekde tiu tempo, la ranoj de tiu lageto neniam kvakas, kaj eĉ, ke tiuj, kiujn oni alportas, siavice iĝas mutaj.

La libroj ankaŭ raportas, ke la bona oldulo Domico mortis en sia Fouencamps-a ermitejo la 23-an de oktobro 775, kaj ke, sur lia tombo, spontane kreskis floroj dolĉege parfumitaj.

Ulphe mortis dek tri jarojn poste en la paco de la Sinjoro, instruinte la religion al la junaj fraŭlinoj, kiuj vizitis ŝin, kaj fondinte monaĥinejon en Amiens sur la strato nomata "de la Virgulinoj" kaj poste "de la Virgulinetoj" kaj fine "de Vergeaux". Kaj el ŝia kadavro ankaŭ eliĝis agrabla aromo.

Sendita de M. COLLEU

+++++

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1992: 2) S-ino LAFARGUE (Val de Marne); 3) S-ro BON (Ch. Maritime); 4) S-ino BRARD (Gironde); 5) S-ro CASTETS (Gard); 6) S-ro CHASSEAU (Paris); 7) S-ro GINESTE (S-Maritime)

Plej fratan bonvenon al ili, kaj ĝis baldaŭa ekkono.

Bonfarantoj: 6) S-ino GILLES (B-Rhin); 7) S-ino LAFARGUE. DANKEGON!!

SKIZO PRI LA RELIGIA HISTORIO DE LIONO

I. LA MARTIROJ.

Liono, ĉefurbo de Gaŭlujo, verŝajne akceptis la fidon en la komenco de la II-a jc. Uni opinias, ke en 150 la Eklezio de Liono jam prosperis.

En 177, kiam okazis la jara festo, kiu kunigis delegitojn el la tuta lando, la popolo denunciis la kristanojn kaj oni arestis kelkajn. Proceso komenciĝis. Blandina, juna kristana sklavino, konfesis: "Mi estas kristanino kaj ĉe ni oni faras nenion malbonan".

La episkopo Pothino, 90-jara, kvankam malsana kaj malforta, donis belan ateston pri sia fido. Batite per piedbatoj kaj manbatoj, li fine estis ĵetita en malliberejon, kie li mortis du tagojn poste.

La aliaj arestitaj kristanoj, kiel Pothino, restis fortaj dum la turmentadoj, kiujn ili ricevis en la amfiteatro. La nomoj de kelkaj el tiuj martiroj estas konataj. Inter ili Ponticus, kiu estis nur 15-jara. Blandina estis ligita ĉe stango meze de la amfiteatro. Dum oni turmentadis ŝiajn gefratojn en Kristo, ŝi preĝis kuraĝigante la aliajn ĉefe Ponticus. Oni daŭre turmentadis Blandinan, batante ŝin per vipo. Poste oni metis ŝin en reton antaŭ ol submeti ŝin al la furiozo de virbovo. Sed ŝi ankoraŭ vivis kaj oni buĉis ŝin.

La korpoj de la martiroj restis dum ses tagoj je la vido de la popolo. La paganoj insultadis ilin. Poste ili bruligis la korpojn, dirante: "Kaj nun ni vidos, ĉu ilia Dio relevos ilin".

II. PAULINE JARICOT KAJ LA MISIOJ.

En 1822, Pauline Jaricot (1799-1862), liona junulino, estis apenaŭ 23-jara. Kun aliaj junulinoj, ŝi interesiĝas pri la misioj. Helpate de sia frato, P-ro Phileas, ŝi kreis la asocion por la disvastigo de la kredo kaj tiel bone organizis ĝin, ke ekde la unua jaro, ŝi kolektis 22 915 frankojn por la misioj. Poste, dank' al la apogo de la liona ĉefepiskopo, kardinalo de Croy, la societo prosperis kaj disvastiĝis en la tutan Eŭropon.

La sukceso estis granda: la mono amase alvenis kaj forte helpis la misiistojn. Samtempe la asocio klopodis interesi la katolikojn je la misiado kaj la kongregacioj de misiistoj kreskis en la tuta Francujo. En Liono mem, en 1856, M-ro de Marion-Bresillac fondis la Afrikajn Misiojn de Liono, kiun ĉiuj konas.

III. PASTRO COUTURIER KAJ LA EKUMENISMO.

Jam en 1274 Liono konis klopodon por unuigi katolikojn kaj ortodoksojn. En la liona ĉefpreĝejo, koncilio kunigis katolikajn kaj ortodoksajn episkopojn, kiuj starigis la unuecon de la tuta kristanaro. Bedaŭrinde, tio ne daŭris kaj, kelkajn jarojn poste, denove la skismo ekfloris.

Sed post longa tempo, Liono ree klopodis por favorigi la ekumenismon, pere de simpla pastro el Liono, P-ro Couturier (1881-1953). Tiu ĉi interesiĝis pri la ortodoksa eklezio kaj en lia animo naskiĝis la angoro de la unueco.

Li kreis la semajnon de la universala preĝo por la unueco, kiun ni ankoraŭ konas kaj praktikas. La propono de P-ro Couturier tuj trovis favoron, ne nur ĉe la katolikoj, sed ankaŭ ĉe la ortodoksoj kaj protestantoj. La ideo prosperis kaj iam post iom ĉiuj kristanaj eklezioj konsentis organizi tiun semajnon por la unueco. En 1940 P-ro Couturier akceptis en sia liona oficejo pastoron el Genevo. Li nomiĝis Roger Schutz, kies agado en Taizé daŭrigas la agadon de P-ro Couturier.

En Liono en 1954, Centro por Kristana Unueco estis starigita por studi ekumenismon.

IV. LA SOCIA AGADO.

Liono estas fama ankaŭ pro la agado de la katolikoj sur la socia kampo. Jam en la jaro 1666, juna liona pastro Charles Démia (1637-1689) sendas al la urbestro raporton pri la neceso starigi lernejojn. La urbestro nenion faras kaj P-ro Démia kreas la "etajn lernejojn" tute senpagajn por la knaboj. La sukceso estas granda kaj kelkajn jarojn poste, li kreas la fratinojn de S-ta Karlo por instrui la knabinojn. Tiuj lernejoj funkcias ĝis la Franca Revolucio.

Kiam la situacio de la laboristoj iĝis problemo, Auguste Gruffaz starigis la unuan sindikaton en Liono en 1884. Kvin jarojn poste, daŭre en Liono, F-ino Rochebillard kreis la sindikaton de la komercaj oficistoj.

Sed la sociaj problemoj estas ĉiam aktualaj. Konata lionano, Marius Gonnin, starigis la unuan "socian semajnon" kaj organizis sukcesan kunvenon en Annecy. La impulso estis donita kaj de post 1904 la sociaj semajnoj regule okazis ĉiu-

jare, krom dum la mondmilitoj.

El prelego prezentita en Francheville de A.B.
okaze de la kongreso.

XX

LA SUNHORLOGOJ

La sunhorloĝo estas tre antikva. La Kaldeoj jam konis ĝin. La sunhorloĝoj iĝis multnombraj dum la romia epoko kaj poste dum la mezepoko kaj renesanco.

Kompreneble, la sunhorloĝoj troviĝas ĉefe en la regionoj, kie la suno ofte ardas, do en la sudaj regionoj. Multaj palacoj, abatejoj aŭ urbodomoj havas sunhorloĝojn sur muroj. Kelkaj eĉ posedas internan sunhorloĝon. La muzeoj en Bourg en Bresse, Liège kaj La Chauds de Fonds havas diversajn sunhorloĝojn en siaj mon-trofenestroj.

Ofte la sunhorloĝoj estas bele ornamitaj kaj kolorigitaj. Oni vidas sur ili florojn, fruktojn, bestojn, kiel kokon, sciuron, aglon... La plej multaj havas la daton de la konstruado kaj devizon, plej ofte en la latina (70 %) aŭ en la nacia lingvo. Kelkaj devizoj rilatas:

- la sunon: Sine sole, nihil sum. (Sen suno, mi estas nenio)
- la vivoĝojon: Horas non numero nisi serenas. (Mi nombras nur la serenajn horojn). Carpe diem. (Profitu la tagon)
- la elreviĝon: Tempus volat, hora fugat. (La tempo flugas, la horoj forflugas)
- la religiajn sentojn: Ora, ne te fallat hora. (Preĝu, por ne maltrafi la horon)

Ĉu la sunhorloĝoj estas nur antikvaĵoj en nia epoko de elektronaj horloĝoj? Multaj asocioj, kiel Club du Vieux Manoir (Klubo de la malnova kastelo), zorgas pri renovigo de la sunhorloĝoj; multaj homoj, pli kaj pli ŝatas meti sunhorloĝon sur sian kamparan domon.

(laŭ la revuo "La cohorte")

XX

SOMERAJ RENKONTOJ EN GRESILLON

24/6/1992-9/7: internacia amika renkonto; 9/7-22/7: prelegoj kaj kursoj; 23/7-5/8: lernu, praktiku, perfektigu - seminario Cseh-metodo; 6/8-19/8: kursoj, konversacio 20/8-2/9: instruado kaj instru-helpiloj - korbofarado.

Informoj kaj aliĝoj: F-ino P. BABIN 17, rue César Franck 44240 LA CHAPELLE/Erdre.

XX

I.K.U.E.-MEMBRARO

1. S-ro SAUTREUIL; 2. S-ro THIOLLIERE; 3. P-ro SCHNEIDER; 4. S-ro BLIN; 5. F-ino CHATELUS; 6. S-ro MILLET; 7. F-ino VANNEAU; 8. S-ino CHEVERRY; 9. S-ro BESSIERE; 10. S-ro BERNARD; 11. S-ro GOURDON; 12. S-ro AMOUROUX; 13. S-ro JOSSINET; 14. S-ro FARDET; 15. S-ro LECOCQ; 16. S-ro L. VERNIN; 17. S-ro P. VERNIN; 18. S-ro SAMSON; 19. P-ro GOUDE; 20. S-ro ROYER; 21. S-ro COLAS; 22. S-ino LLORENS; 23. S-ro CULARUOTOLO; 24. P-ro HEROUX; 25. F-ino GIUDICELLI; 26. P-ro RUNPAOT; 27. S-ino GILLES; 28. S-ro SEGUIN; 29. S-ro PONS; 30. S-ro MARTIGNON; 31. S-ino MARTIN; 32. S-ro DOYELLE.

XX

Komerca uzo de esperanto

La komerco-ĉambro de la departemento Meuse jam la duan fojon eldonis inventaron de la lokaj industriproduktaĵoj pere de Esperanto. La eldono de 1992 fakte aperas en la franca, angla, germana kaj ESPERANTO. Tiu iniciato estas tre grava por la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto en la komercaj inter-ŝanĝoj.

S-ro GILBERT, direktoro de la Meuse-a komerco-ĉambro kaj estrarano de I.K.E.F. (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo), kunlaboranta faka asocio de U.E.A., ŝatus ricevi kiel eble multe da reagoj de niaj legantoj je tiu anonco. Skribu rekte al: Chambre de Commerce de la Meuse

6, parc Bradfer
55000 BAR-le-DUC

DEFENDANTO DE LA KRISTANA MORALO

Devion de la kristanaj moralaj principoj, senspiritigon de la socio kaj regadon de la materiaj valorajoj konsideris la franca verkisto Georges BERNANOS kiel ĉefan kaŭzon de la morala degenero kaj senĉesa malleviĝo de la individua kaj ĝenerala moraleco. Elirejon el ĉi tiu situacio li trovas en renovigo de la "malnovaj" idealoj kaj en reveno al kristane konceptata honoro. La vivcelon de la homa li vidas en batalo kontraŭ malbono, en spirita lukto, en fina puriĝo kaj reaĉeto. La vojo al Dio estas malfermita per senkulpeco, pureco kaj per simpla beleco de la animo.

Georges Bernanos naskiĝis la 20-an de februaro 1888 en Paris. Post filozofiaj kaj juraj studoj, li travivas la tutan unuan mondmiliton sur la milita fronto, el kiu li revenas profunde skuita. La profundan seniluziigon al li preparis ankaŭ postmilita ordigo de la mondo. Li sentis bezonon stariĝi kontraŭ moralan konformismon, senprincipecon kaj kreskon de la perforto en samtempaj totalismaj reĝimoj.

Li debutis kiel ĵurnalisto, sed kiel proza verkisto li famiĝis en 1926 per romana unuaĵo "Sub la suno de Satano". La libro vekis grandan atenton kaj per la literatura kritiko ĝi estis taksata kiel "verko el spirito de Pascal kaj Dos-tojevski". Pri tio, ke ĝi efike alparolas eĉ la nuntempan mondon, atestas ankaŭ ĝia kinematografia prilaboro, kiu gajnis Grandan Premion en la Internacia Filmfestivalo en Cannes en 1987.

Inter la plej konataj verkoj de Bernanos troviĝas la romano "Taglibro de kampara pastro" (1936), kiu primeditas la sencon de la vivo de soleca kaj forlasita sacerdoto kaŝanta sub la kaduka korpa eksteraĵo eksterordinaran riĉecon de la spirita vivo. Eĉ ĉi tiu romano ĝisatendis sian filman version, kiun en 1950 efektivigis la eminenta franca reĝisoro Robert Bresson.

Plia grava verko estas la romano "Morteca paroĥo", el la jaroj 1931-40, do el la tempo de aliranta faŝismo. En ĝi reflektiĝas antaŭtimoj pro la disvastiĝanta indiferenteco rilate al la kristanaj valoroj. En ĉi tiu malfacila tempo, Bernanos kuraĝe starigas sin flanke de Mauriac kaj Maritain kaj li malfermitece sentas kontraŭ Franco-isman perforton en Hispanujo. Li ne hezitis publiciste batali kontraŭ la munkenajn kontraktojn kaj subteni la francan rezistan movadon "Grandaj lunaj tombejoj" (1938), "Skandalo pro la vero" (1939), "Humiligitaj infanoj" (1949)

La literatura verko de Bernanos pritraktas spiritajn konfliktojn, ĝi tuŝas fundamentajn ekzistoproblemojn, kaj pro tio li ne lasas la leganton en trankvileco, sed li alarmas lian konsciencen eĉ hodiaŭ, post forpaso de duonjarcento. En ĉi tio baziĝas lia daŭra societa aktualeco, kiel tion esprimas ankaŭ konsidero de la aŭtoro en la eseo "Humiligitaj infanoj": "Ne, mia kantoj ne estas senmortecaj, sed tio, kion mi kantas estas senmorteca".

Georges Bernanos, kiu estas konsiderata kiel unu el la plej signifaj kato-likaj verkistoj de la XX-a jc., mortis la 5-an de julio 1948.

Laŭ artikolo de František Zeman en "Katolické noviny" n° 30/1988, tradukis Milošlav Švaček.

oo

GENERALA KUNVENO EN FRANCHEVILLE (2/5/1992)

Kard. Decourtray ne respondis al S-ro Bessières: eble li estas embarasita, ne konante la L.I., kaj li havas multajn okupojn. Male, la rektoro de la baziliko de Fourvières estas favora. P-ro Héroux daŭrigos la kontaktojn.

Agad- kaj financ-raportoj aprobitaj. Kiam ĝi estos preta, ni aĉetos la Espo-meslibron. Por povi helpi eksterlandanojn partopreni en Lourdes, ni petos pli altan kongreskotizon (60 F).

LOURDES; la fratinoj de la "Assomption" ne povas akcepti nin, sed hotelo "Panoramic" taŭgas. Ni rezervis de la 14-a ĝis la 19-a de aprilo 1993. Se venos 30 partoprenantoj, ni plenigos la hotelon kaj tio faciligos la laboron.

VENONTAJ KONGRESOJ: en 1994, ni antaŭvidas en orienta Francujo.

I.K.U.E.: ne respondas al leteroj. Ĝus aperis informo pri IKUE-KELI-kongreso en Hungarujo. Nenio pri elektoj; sed la aprobo de la asocio fare de la Papo estis urĝa tasko kaj nun honega efektiviĝo.

BULTENO: aldoni 2 aŭ 3 liniojn franclingve por ne-esperantistoj.

RIMARKOJ: S-ino Ravenstein, nova membro, diras, ke ni tro parolis pri Eo-aferoj, ne sufiĉe pri la religia temo (taskoj pri aliaj kontinentoj, amaskomunikiloj). Eo estas ilo por katolikoj, por plibonigi la vivon de homoj.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX(XX)XXXXXXXXXX

KOMITATKUNVENO EN FRANCHEVILLE (2/5/1992)

INFORMADO KAJ VARBADO: letero al P. Saunier, revuo A.G.M. estis bona okazo reĝusti-
igi la informon pri la nuna situacio de la L.I.

En "Vie montante" aperis artikolo; 2 leterojn ricevis F-ino Preux.

"Franca esperantisto": la artikolo de S-ro Despiney alportis 5 informpetojn.

LOURDES: programo en preparado. Alilandaj gastoj (P-ro Zielonka el Pollando)

Invito al 2 afrikanoj, kriplulo, protestanto.

Pilgrimo sub la patroneco de P-ro Peltier, kies biografieton ricevu la partopren-
antoj. Preparo de flugfolioj por Lourdes, dismetotaj ekz. en Kolbe Domo, Video-

~~-XX~~
Kaseno Francilingva, Banderoloj "Esperanto-frateco Katolika Universalaj"

Vizitoj al katolikaj mondaj organizaĵoj. Laŭ la rezultoj, kiel daŭrigi.

Arigi la katolikajn esperantistojn loĝantajn ĉirkaŭ Lourdes.

Instrui la hotelestrojn; inviti la fervojistojn.

Dum la IKUE-KELI-koĝreso, anonci pri Lourdes.

Prepari de dulingva gvidlibro pri Lourdes kun mini-gramatiko.

Eo libroj en butikoj, ekz. "Kompaso" de F-tino Theotima Rothaus.

PROVIZORA PROGRAMO - temo: "Paco por ĉiuj nacioj"

merkredon 14/4/1993: posttagmeze, alveno, persona vizito al la groto
vespere: interkono

ĵaŭdon 15: matene, prezento de la temo, grupa diskuto
posttagmeze, pilgrima preĝo al la tombo de P-ro Peltier
vespere, lum-procesio

vendredon 16: matene, raportoj kaj decidoj
posttagmeze, religia ekskurso aŭ krucvojo
vespere, lum-procesio aŭ religia festo

sabaton 17: matene, ĝenerala kunveno
posttagmeze, ekskurso al Bartès
vespere, lum-procesio

dimanĉon 18: partopreno en lourdes-celebradoj- lum-procesio

lundon 19: forveturo

POZITIVAJ PROJEKTOJ

TEMO: Ĉu la Eklezio de Kristo, kaj sekve ni katolikaj esperantistoj, havas anko-
naŭ valoran, eĝgravan rolon en la nuna kaj estonta mondo?

La mondo malgrandiĝas, la baroj forfalas, multaj popoloj disiĝas kaj in-
termiksiĝas sur la tero, kie kreskis diversaj kulturoj. La informrimedoj, dank'al
la ondoj, al la satelitoj, pli kaj pli ĝeneraliĝas. Niaj celoj: edukado, interko-
no, spirita proksimiĝo, same kiel sciencoj, artoj k.s. devas uzi la samajn vojojn.
La kontribuo de kristanoj al la disvastiĝo de la proponoj por la homa, socia,
spirita progreso, devas uzi la ekzistantajn organojn. Pro tio, la sinteno devas
esti: reciproka kompreno, sed ankaŭ esprimo per parolo, per agado, de la forto de
niaj principoj. Kaj ĉefe, per la manifestado de la fruktoj de nia komuna vivo, de
niaj donoj al ĉiuj popoloj, ĉefe al kiuj suferas pro mankoj. Kaj en tio, ĉefe la
unueco de niaj ekleziroj en Kristo, en tute frata ekumenismo, pezos, en la venonta
jarcento, sur la fizika, socia, politika sano de nia planedo, inter la multaj et-
noj, kulturoj, kredoj, religioj, soviaj statoj.

Ni devas, por la individuoj same kiel por la planedo, pli agi sur la kaŭ-
zoj ol korekti la konsekvencojn. Korekti la nunajn malbonajn konsekvencojn de la
monda malordo estas necese sed senfine: ekz. aideso, Golfo-milito, Kurdoj, dikta-
toroj, misorganizo de la internaciaj monoj, mallibera organizo de edukado. Tie
la laboro de Patrino Tereza estas senfina.

Samtempe kaj unue, ni celu starigi la plej homan mondan ordon, ekz. paca
ekvilibro, libereco de ĉiu valoro religia aspekto, monda justeco inter nacioj kaj
popoloj, favoro aŭ mondiĝo de urboj (Mondcivitanoj, "Ecole, instrument de Paix",
de Muhlethaler), aldono de "Ĝambro de popoloj" (ekz. Kurdoj) al la nuna "Unuiĝint-
aj Nacioj", kiuj nun estas nun unuiĝintaj registaroj.

Rolo de la L.I. estas glatigi la rilatojn inter la neriĉaj potencoj.
Sed se oni ne trafas la junularon, oni neniam povas progresi.

PROJEKTOJ: 1. TV kaj radio tre influas ĉie en la mondo, eĉ en tre malriĉaj kaj
apartaj regionoj. Partopreni en la elsendoj de la privataj radio-stacioj. Iu ajn
rajtas surbendigi kaj sendi al radio-stacio por elsendo.

2. Skoltoj. Kun la helpo de SEL, trafi skoltestrojn.

- 3. Partoprenigi alilandanojn en ĉiuj E^o-kunvenoj.
- 4. En Lourdes, kunvenigi katolikojn el diversaj landoj.
- 5. Ekumena kongreso en suda Francujo: IKUE ne respondas. S-ta Jozefo el Montrouge kuŝas apud protestanta centro, kaj povas akcepti kunvenantojn.
- 6. Banneux: en septembro 1992, partoprenas: Belgujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Luksemburgio kaj Nederlando. Ĉu pilgrimi ĉiujare aŭ ĉiun duan jaron?
- 7. P-ro Eichkorn diras, ke IKUE hone kaj regule progresas en Germanujo.
- 8. Konvinki la hierarkio pri la utileco de E^o, por ekumenismo, protekto de la malfortaj lingvoj. Malfacilaĵoj en la eŭropa sinodo 1991 pro la lingvaj grupoj. Kio pri la afrika sinodo? Rilatoj inter amerikaj kaj eŭropaj katolikoj, kaj inter ĉiuj religioj, bezonas bonan ilon. "La mondo estas unu aŭ ne estas" (A. Einstein) Ĉio indikita por la mondo valoras por Eŭropo kaj Francujo.

EUROPO: Ĝi nun estas komunumo de 12 landoj; pliaj petas kaj pliaj petos. Kiel partoprenantojn en Eŭropo, ni devas estonte konsideri la nordajn kaj orientajn landojn. Ekonomie, estas kaj eĉ pli estas grandaj diferencoj inter landoj kaj regionoj, riĉaj kaj malriĉaj. La celo de Eŭropo estas helpi de unu al alia; sed materialismo kreas egoismon kaj timon. Religie, ankaŭ diverseco, sed la 3 ĉefaj (katolika, protestanta, ortodoksa) havas la saman fundamenton. Krome estas judaismo, pli kaj pli islamismo, kaj sektoj multobligas en ĉiuj landoj.

1. Ni devas batali kontraŭ egoismon kaj timon, ami unu la alian. "Ne timu!" (J.P.II) Ĉu religio estu la pinto de la eŭropa spirito? Ekumenismo estas la solvo: renkonto en Assise 1986.

2. Franse de religioj, kunigi "la homojn de bona volo", en planeda ekumenismo. Parolante pri Eŭropo, oni ne forgesu la multajn ligojn inter Eŭropo kaj la mondo.

3. La kristanaj esperantistoj devas, kiel diris S-ta Tereza, unue konvertiĝi, kaj vivi laŭ sia fido; tiucele mediti la Evangelion, vivi de la amo de Dio (Elizabeta de la Triunuo). La nuntempaj homoj bezonas pli da vivmotivoj ol da vivrimedoj.

4. Praktike: Villingen (P-ro Eichkorn) kunlaboras kun eksa GDR, Ĉeĥoslovakujo, Pollando. Ne trudi la plej gravan lingvon, la germanan, sed, en ĉiu kunveno, la lokan lingvon kaj E-on. Malfacilaĵoj de la 4 svisaj lingvoj montras danĝeron.

Ĉio indikita por la mondo kaj Eŭropo validas por Francujo.
FRANCUJO: 1. Kontraŭ la perdo de la Krista fido, ni uzu TV kaj radion (Fourvières montras modelon.

2. Katolikoj faru socian agadon, disvolvu la studadon de sociaj problemoj (ekonomio, edukado, RMI kaj RME, ekzistado (La Croix, 6/2/1992). En edukado, instigi kaj favorigi pli personajn konvinkojn.

Protokolis: P-ro A. HEROUX

STAGĜOJ EN BOURESSE (Vienne)

JULIO: de la 2-a ĝis la 7-a: ekkono de la regiono Poitou - romanika arkitekturo, legendoj kaj kuirarto.

de la 10-a ĝis la 15-a: preparado al A. pri Pedagogio kaj Diploma pri Altaj Studoj - gramatiko, tekstokomentoj, vortaro. Ebleco daŭrigi la ekzercoj en la posttagmezoj de la posta staĝo.

de la 17-a ĝis la 22-a: la "apudbelétro" en E^o (E. Borsboom)

AUGUSTO: de la 5-a ĝis la 10-a: dunivela tradukado - per progresantoj (S. Bourot) literaturaj tekstoj por la pli lertaj (G. Lagrange)

De la 13-a ĝis la 18-a: pupfarado kaj kudrado (M. Hunninck) studo de la fakterminaro

de la 20-a ĝis la 25-a: kanzonoj (C. Vennin) skeĉoj (TESPA)

OKTOBRO: praktikado de la lingvo - parola parto de A. pri Kapableco

NOVEMBRO: ĝenerale pri literaturo

Pli precizajn programojn petu de: SYM Route de Civaux 86410 BOURESSE

KASISTINA ANGULO

Tre koran dankon kaj gratulon al tiuj, kiuj tuj reagis je la alvokletero. Restas dekkvino da neglektuloj, ve! Ili bonvolu ekzameni sian konsciencon .. kaj sian kontlibron aŭ la stumpojn de siaj ĉekoj, kaj kiel eble plej baldaŭ reguligi la aferon. Ne eblas plu sendi la bultenon al ili se ili ne sendis vivsignon ĝis la 30-a de junio. Antaŭdankon pro via komprenemo, kaj agrablan libertempon al ĉiuj membroj.

TRADUKRONDO

Nur 2 (du) lagantoj pozitive respondis la alvokon aserintan en la marta numero de F.K.E. Por kuraĝigi pliajn, jen kelkaj precizigoj pri tiu lingva rubriko, kiu fakte iel anstataŭas la iaman tradukadon de tipe francaj esprimoj.

El kio do konsistas la tradukrondo?

La gvidantino proponas francan tekston tradukatan en Esperanton. Si korektas la ricevitajn tradukojn, kompilas komenton surbaze de la faritaj eraroj, reŝendas la tuton al la partoprenintoj, kiuj komparas la proponitajn tradukojn, ŝiaŭvice rajtas komenti, pridemandi kaj fari rimarkojn. Ĉu tio ne estas bona maniero lingve perfektigi? Ne plu hezitu, aliĝu ĉe S-ino J. Vincent (v. p. 1)

Por ke la intereso viglu, estas konsilinde ne konservi la materialon de la rondo pli ol unu semajnon.

ENHAVO

- | | |
|---|-------------------------------------|
| 1. Le mot du président | 5. Defendanto de la kristana moralo |
| 2. Mia sola subtenanto | Generala kunveno en Francheville |
| Kaj la ranoj silentis | 6. Komitatkunveno |
| 3. Skizo pri la religia historio de Liono | Positivaj projektoj |
| 4. La sunhorloĝoj | 7. " |
| Komerca uzo de Esperanto | 8. Tradukrondo |

KOTIZTABELO 1992

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F
geedza paro 50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F
bonfaranto 200 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E^o Actualités" 250 F
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 260 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

Dépôt légal: 2ème trimestre 1992 !! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! sous le n° 2523 bis-J.O. 23/05/1977)
Directeur: Albert BESSIERE !! au prieuré St-Martin
Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
René-Jean MARMOU !! FRANCE